Estimataj,

Mi ĝojas inviti vin al novaj ekumenaj

BIBLIAJ TAGOJ kun Adoru 2013!

Ili okazos de la 13a ĝis 17a de marto 2013 en la Kultura Centro S-ta Tomaso (de Akvino), en la europa urbo Strasburgo. (Centre Culturel Saint Thomas, 2 rue de la Carpe Haute, 67000 Strasbourg. Tel. 03 88 31 19 14)

Strasburgo estas sufiĉe centra urbo, el multaj vidpunktoj: geografia, trafika, politika, historia kaj eĉ ekumena. Ĝi estas atingebla komforte per auto, trajno kaj aviadilo.

Kion ni faros?
-Ni auskultos kaj diskutos pri tekstoj el la Biblio
- Ni kantos kantojn, el Adoru, kaj aliajn
- ni ofertas diversajn preĝtempojn laŭ diversaj tradicioj: matenaj kaj vesperaj preĝoj kaj laŭdoj, katolikaj sanktaj mesoj, k.a. Tiel ni praktikos el la riĉeco de Adoru. (Kompreneble ĉiu povas partopreni kion kaj kiom li deziras!)
- ni ekskursos al la urbocentro
- ni havos sufiĉe da okazo ĝui amikan internacian Esperanto-etoson dum manĝoj, libera tempo, kaj…

Kiom kostos la restado?
Mi antaumendis por 30 personoj, 18 litojn en dulitaj ĉambroj kaj 12 litojn en individuaj ĉambroj. Ju pli frue vi mendos, des pli certe mi povas garantii al vi la deziratan ĉambron!
Tranoktado en dulita ĉambro kun kunulo kostas po 26 € por persono kaj nokto. Se vi bezonas individuan ĉambron, tiu kostas po 32 € por persono kaj nokto. En tiu prezo, littukoj estas inkluzivaj, kaj ankau la respektiva matenmanĝo.
Tagmanĝo kostas 12,50 €, vespermanĝo: 10,-€.
Tio signifas sume: (26+12,50+10) €, x 4 tagnoktoj=194 €,
aŭ (32+12,50+10) €, x 4 tagnoktoj=218 €.

Estas ebleco por paŭza trinkaĵo matene (kafo/teo/lakto), kiu kromkostas 1 € por fojo, kaj posttagmeza manĝaĵo de seka kuko kun kafo/teo/lakto/oranĝosuko/akvo, kiu kromkostas 2 €. Mi proponas tiun paŭzan trinkaĵon en ĵaudo, vendredo kaj sabato, kaj la paŭzan manĝaĵeton en vendredo (en la aliaj du posttagmezoj, ni ekskursos). Tamen vi devas antaŭmendi tiujn paŭzaĵojn, kaj per tio altiĝos via pagenda sumo, do en la proponita kazo je 5 €.

Eblas ankaŭ partatempa partopreno, sed kompreneble ni ĝojas, se vi povas dividi la tutan tempon kun ni!

Via aliĝo (kaj antaumendo de ĉambro) ekvalidos per la alsendo de la necesaj informoj (vidu malsupre) kaj antaŭpago (por organizaj kostoj, do ne por la domo!) de **30 €** (orient-europanoj: 15 €) al mia konto: 6242548500, ĉe Volksbank Hellweg e.G., BLZ 41460116.

IBAN: DE25 4146 0116 6242 5485 00, BIC: GENODEM1SOE.

Ne forgesu la indikon: „BIBLIAJ TAGOJ 2013“.

Se estas iuj problemoj au demandoj, ne hezitu kontakti min rekte, ĉu letere, ĉu rete!

Esperante baldaŭan revidon, via

Stefan Lepping
Mellinstr.5
59457 Werl
Germanio

Retadreso: stefanlepping@gmx.de

Telefono: (+49) (0)2922/9287098. resp. (0)174/6165428 (bv. telefoni nur en urĝaj kazoj).

Bonvolu (rete aŭ poŝte) sendi al mi ĉi tiun paperon (resp., rete, ties informojn):

Aliĝilo por Bibliaj Tagoj 2013

okazontaj de la 13a de marto (vespermanĝo),
ĝis la 17a de marto (post la tagmanĝo),
en la «Kultura Centro S-ta Tomaso», Strasburgo

Familia Nomo: . . . . . .

Persona Nomo: . . . . . .

Adreso: . . . . . .

Lando: . . . . . .

Retadreso: . . . . . .

Telefono: . . . . . .

Konfesio: . . . . . .

Naskiĝdato: . . . . . .

Faru krucetojn:

☐ Mi mendas individuan ĉambron por 32 €/ nokto

☐ Mi mendas liton en duopa ĉambro por: 26 €/ nokto: Prefere kun: . . . . . .

Mi mendas maten-paŭzan trinkaĵon:

☐ Ĵaŭdon

☐ Vendredon

☐ Sabaton

Mi mendas posttagmez-paŭzan manĝaĵeton:

☐ Vendrede

Aŭ:

Aliaj rimarkoj/ demandoj: . . . . . .
. . . . . .
. . . . . .
. . . . . .

Mi havas kaj kunportos:

☐ Biblion
☐ Adoru-n

La aliĝo ekvalidos per ĝiro de **30 €** da kotizo al konto de Stefan Lepping:
BIC: **GENODEM1SOE** - IBAN: **DE25414601166242548500**.
Nepre indiku „Bibliaj Tagoj 2013".
Bonvolu ankaŭ sendi ĉi tiun slipon al:
Stefan Lepping, Mellinstr, 5, 59457 Werl, Germanio:
aŭ al Retadreso: stefanlepping@gmx.de